

## LITURGIO ESTAS FESTATA DOGMO

*Inter liturgio kaj kredo ekzistas tuŝapuda reciproka rilato. Liturgiaj malordajoj malfortigas la kredon. D-ro Gero Weishaupt eksplikas eklezjurajn aspektojn de la liturgiaj malordajoj kaj montras, kion povas la kredantoj tial fari. La eklezia juristo Weishaupt estas el nederlanda diocezo Hertogenbosch.*

La Papo Johano Paŭlo la Dua en sia lasta enikliko *Ecclesia de Eucharistia* (La Eklezio vivas el Eŭkaristio), kiun li dediĉis al mistero de sankta Eŭkaristio, atentigas pri tio, ke la liturgiaj malordajoj kontribuas al „malheligo de la vera kredo kaj la katolika instruo pri tiu ĉi mirakla sakramento“. Li laŭvorte skribas:

„Bedaŭrinde apud tiuj ĉi helaj ecoj *ne mankas ombroj*. Ekzistas la lokoj, kie oni preskaŭ tute forlasas la kulton de la eŭkaristia adorado. Al tio aliras en tiu ĉi eklezia konekseco malordajoj, kiuj kontribuas al malheligo de la vera kredo kaj la katolika instruo pri tiu ĉi mirinda sakramento. Elmergiĝas iafoje ege simpligada koncepto de la eŭkaristia mistero. Ĝi estas senigita de sia ofera valoro kaj estas travivata tiel, kvazaŭ ĝi havus neniun alian sencon kaj valoron ol kiel la komuna frateca renkonto. Krom tio neceseĝo de la sakramenta pastreco, kiu sin apogas je la apostola sekvanteco, restas iufoje en la fono kaj la sakramento de la Eŭkaristio estas reduktata je simpla predikado. Tiukaze ankaŭ la ekumenaj iniciatoj ofte, malgraŭ tio, ke ili estas noblanimaj en intenco, disponas la spacon por la eŭkaristiaj praktikadoj, kiuj kontraŭas al disciplino, kiun la eklezio esprimas per sia kredo. Kiel ne montri super tio ĉi ĉio profundan doloron? La Eŭkaristio estas ege granda donaco, ol ĝi povus toleri ambiguecon kaj reduktion de ĝia signifo.“ (10)

La Papo parolas pri la kontinueco inter la maniero, kiel estas solenata la Eŭkaristio, kaj tio, kion ni kredas. La liturgio estas solenado kaj esprimo de la kredo de la eklezio kaj la kredo de la eklezio sin evidentiĝas en la liturgio. La liturgio estas spegulo de la eklezia instruo, ĝi estas la solenata dogmo. En

oracioj, legaĵoj kaj kantoj, en ritario kaj rubrikoj de la mesa solenaĵo trovas la kredo de la eklezio sian esprimon. En ambaŭ formoj de la roma ritario, la ordinara eĉ kromordinara, estas eldirita la kredo de la eklezio, eĉ se per diferenca maniero. Tial estas la maniero, per kiu oni solenas la liturgion, ankaŭ la normo de la kredo kaj male la kredo estas la normo por nia liturgia preĝo. Ambaŭ sin reciproke kondiĉas.

El tio rezultas, ke la kredo estas damaĝata, se la liturgio ne estas solenata laŭ la kredo. Kaj male validas: La liturgio estas falsigata, se ĝi ne komunikas la kredon, kiam la veroj de la kredo estas dubigitaj aŭ neadaj. La liturgiaj malordajoj estas je unu flanko sekvo de perdo de la kredo kaj je la dua flanko ili kontribuas al ĝia malheligo, kaj per tio al krizo en la eklezio. En sia aŭtobiografio skribis kardinalo Ratzinger trafe: „Mi estas konvinkita, ke la eklezia krizo, kiun ni nuntempe travivas, baziĝas plejparte sur disfalado de la liturgio, kiu estas iufoje eĉ tiel formulata, »etsi Deus non daretur« (kvazaŭ Dio ne ekzistus): kvazaŭ en ĝi tute ne gravus, ĉu Dio ekzistas kaj ĉu Li volas nin alparoli kaj elaŭdi.“ (Joseph Kardinal Ratzinger, *Aus meinem Leben*. Erinnerungen, Munkeno 1997)

La liturgiaj malordajoj havas siajn radikojn ne malofte en falsa koncepto de la libereco (*Redemptionis Sacramentum* 7), en la false konceptata „kreiveco“, kiu por la eklezio havas tragikajn postsekvojn, kiel ni devas hodiaŭ tion dolorige travivadi. La liturgiaj malordajoj dividas paroĥojn. Tiu, kiu kiel la sacerdoto, diakono aŭ animzorge aktivanta laiko solenas la liturgion laŭ propra konsidero, kiu sin direktas laŭ propraj emoj kaj ne per tio, kion la eklezio kaj la

kredo ordonas, „ekatakas bazan unuecon de la ceremonio“. Li realigas agojn, kiuj tute ne konformas kun malsato kaj soifo pri la viva Dio, kiel tion la hodiaŭa popolo sentas. „Li ne realigas aŭtentikan animzorgan servon kaj ne kontribuas al la liturgia renovigo, sed pli vere la kredantojn priŝtelas de ilia kredtrezoro kaj ilia spirita heredaĵo,“ oni diras en *Redemptionis Sacramentum* de Kongregacio por la Sanktaj Ritaroj (la 25-an de marto 2004). Tiu ĉi instrukcio temas pri iuj aferoj, kiuj tuŝas la Plejsanktan Sakramenton kaj kiujn oni devas obei, aŭ pri aliaj, kiujn oni devas eviti. Tiu ĉi instrukcio, kiu estis publikigita antaŭ pli ol ok jaroj, estas la praktika aplikado de tio, kion teologie kaj spirite prezentas encikliko *Ecclesia de Eucharistia*.

La instrukcio *Redemptionis Sacramentum* distingas tri specojn de la deliktoj: speciale gravaj deliktoj (graviora delicta), gravaj deliktoj kaj aliaj deliktoj. Plendon pri la speciale gravaj deliktoj transdonas episkopo eventuale ordinario por esploro laŭ kanono 1717 CIC simile kiel plendojn pri la seksa misuzo de neplenaĝuloj al Kongregacio por Instruo de la Kredo.

#### **Al tiuj ĉi speciale gravaj deliktoj apartenas:**

- Kaŝtenado de la konsekritaj hostioj kun sakrilegia celado aŭ ilia forĵeto. Pro tiu ĉi delikto sekvas ekskomuniko.

- Ŝajnigo aŭ provo de la liturgia ago de la eŭkaristia ofero.

- Malpermesita kuncelebrado kun servantoj de la ekleziaj komunumoj, kiuj ne havas apostolan sekvantecon kaj validan sacerdotan ordinon kaj kiuj ne estas en plena komuneco kun la katolika eklezio. Por tiuj ĉi krimoj minacas suspensio, ekskomuniko kaj eksigo el la klerika stato.

- Konsekro de nur unu formo kun sakrilegia intenco aŭ la konsekro ekster la sankta meso. Eĉ ne en la plej granda danĝero estas permesite konsekri nur sub unu formo, aŭ sub ambaŭ ekster la sankta meso.

#### **Al la gravaj deliktoj ekzemple apartenas:**

- Uzo de aliaj ol ordonitaj eŭkaristiaj preĝoj. La pastro ne rajtas kompili por si la eŭkaristiajn preĝojn, ŝanĝi la aprobitajn preĝojn aŭ uzadi la preĝojn kompilitajn fare de la privataj personoj.

- Deklari la eŭkaristiajn preĝojn fare de diakono, laiko aŭ la kredantoj.

- Rifuzi doni la sanktan komunion al la kredanto, kiu volas komunii surgenue.

- Rifuzi doni la sanktan komunion en la buŝon.

- Okazoj, kiam la kredanto mem prenas la sanktan hostion aŭ donas la hostion aŭ kalkan el manoj en la manojn.

- Okazoj, kiam la laiko mem entrempas la hostion en la Sangon de Kristo.

- Meto de la entrempita hostio sur la manon de la kredanto.

- Mescelbro sen la pastraj vestoj aŭ nur kun stolo.

#### **Al la aliaj deliktoj apartenas:**

- Disrompo de la hostio jam ĉe la transsubstanciĝo.

- Ŝanĝadi la liturgiajn tekstojn laŭ propra bontrovo.

- Lego de la evangelio fare de laiko.

- Laika prediko kadre de la sankta meso. Tio validas ankaŭ por porpastraj seminarioj kaj specialaj grupoj kaj asocioj de la laikoj.

- Deklari la kredkonfeson en alia versio, ol kiu estas en aprobitaj liturgiaj libroj.

- Disrompo de la konsekrita pano fare de laiko.

- Dono de la sankta komunio al ne kato-likoj (eĉ ne la baptitaj).

- Komisii laikon disdonadi la sanktan komunion, kvankam tion la neceso ne postulas.

- Donado de la sankta komunio al la kredantoj antaŭ la komunio de la mescelbranto.

- Uzado de simplaj ujoj, la ujoj sen artismaj valorecoj, ujoj el vitro, porcelano, ceramikaĵo aŭ aliaj fragilaj materialoj.

■ Donado de la sankta komunio fare de laiko kiel kromordinara disdonanto, se estas ĉeestanta la konsekrita servanto.

■ Anstataŭo de la dimanĉa sankta meso per ekumena Diservo.

Pro gravaj kazoj de la malordaĵoj estas difinitaj punoj laŭ la eklezia juro. En aliaj kazoj difinos regreson episkopo aŭ juĝisto laŭ graveco de la malordaĵo ekde admono, pentofaro (eĉ monpuno kaj malaltigo de salajro) ĝis suspensio kaj interdikto (ĉe laiko), ellaso el la klerika stato.

La kredantoj, kiuj estas atestantoj de la malordaĵoj, rajtas sin turni al la ordinario aŭ rekte al Apostola Seĝo. Sed ili unue se eble provu kun la koncerna persono paroli kaj lin atentigi pri la malordaĵo. Se la koncerna persono tiun atentigon rifuzas kaj plu daŭrigas en la malordaĵaj praktikadoj, estas necese atentigi ordinaron, kaj se la ordinario faras neniujn kontraŭagojn, la kredantoj sin turnu al la Apostola Seĝo. Pri la liturgiaj normoj la kredantoj sin povas informi en la episkopejo aŭ ankaŭ sur la interretaj paĝoj. ■ *Kath-net*